

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

**Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**



**EKO 2023 / 46 Aŭgusto 7, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

Lingva kontrolo): Gbeglo Koffi. (La ceteraj estas en UK sen retaliro en la kongresejo.)

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. PDF: landoj 100 KB. Sume: 530 KB

Temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas koneblaj.

## Afrikanoj en Torino, prepare al UK 2024

Ankaŭ ĉi-jare la tradicia afrika kunveno dum UK okazis hibride en la 1-a de aŭgusto. Partoprenis la kunvenon ĉeeste trideko da kongresanoj kaj ankaŭ homoj defore. Dum pli ol horo estis vicaj atestoj far geamikoj de Afriko subtenantaj projektojn en la kontinento, salutvortoj al la kunveno. Citindas tiu de s-ino Eva Kaluwa, reprezentantino de la tanzania diplomatia domo en Italio. La kunveno grandparte kaj escepte enfokusiĝis pri la Aruŝa UK en 2024. John E. Magessa kaj Costantine Mashauri respektive sekretario kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) anoncis la kolorojn de la venontjara evento en la kontinento. Ili per lumbildoj faris prezentojn pri sia hejmlando Tanzanio, la lando de la 109-a UK. Iliaj prezentoj kaptis atenton de pli ol unu persono en la salono.



La sukceso de la reta elsendo estas plena merito de Francesco Maurelli. Kvankam la ideo pri hibrida kunveno leviĝis lastminute, li helpis aranĝi kaj persone okupiĝis pri la teknika aspekto. Tiel dank' al li homoj, kiuj pro iuj kialoj kaj aliaj ne povis fari vojaĝon al Torino, povis defore spekti la kunvenon. Vendrede en Torino okazis

oficiala prezento pri venontaj UK. Vi rekte de la buŝo de tanzanianoj ekscios pri la venontjara prestiĝa renkontiĝo en Esperantujo. Dume, ni kore bonvenigas vin – ĉu kiel scivolemulojn pri la afrika agado, ĉu kiel eblajn partoprenantojn de la unua afrika UK, ĉu simple kiel esperantistojn – ĉe la afrika budo en la akceptejo. Tie estas montrataj memoraĵoj por donaco: T-ĉemizoj, notkajeroj, ĉapeloj, flugfolioj pri la sekva UK kaj multaj aliaj interesaĵoj kun la emblemo de la 109-a UK. Via vizito al la afrika tablo estos konsiderata kiel simbola rekono kaj subteno pri la movado en Afriko. Certe via vizito al la afrika tablo donos al vi utilon kaj plezuron.

Laŭ teksto de Adĵe Adĵevi en Torino (plej dekstre en la foto).

## La unua tago de ILEI en Lignano

La estrarano de iLEI, Laura Brazzabeni, kiu respondecas pri Kongresoj, jam ĉeestas en la kongresurbo por ILEI kaj TEJO. Ŝi raportas el la kongresejo pri la unua tago de la kongreso en Lignano Orsablà, la 7-a de aŭgusto.

[https://youtu.be/oV9\\_zOVV27w](https://youtu.be/oV9_zOVV27w)

## Honora prezidanto de INK esperantisto

Jordi Solé i Camardons – kataluna socilingvisto kaj verkisto akceptis la taskon fariĝi la honora prezidanto de la tria eldono de INK. En tiu ĉi serio eblas konkursi en ses lingvoj: krom Esperanto, la itala, la ukraina kaj la rusa, estis aldonitaj la kataluna kaj la persa por pli riĉigi la konkursan rikolton ĉi-jare.

Tial ni ĝojas speciale, ke la elekto de la honora prezidanto reprezentas unu el la du novaj lingvoj, kiuj estis aldonitaj al la konkurso. Dum la Universala Kongreso en Torino la gajnintoj de la dua eldono estis anoncitaj. La kongresa sako enhavas kiel donacon la plej novan novelaron de INK: *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*. La temo de la tria konkurso estas **La sekreta vivo de miaj najbaroj**. La limdato por sendi maksimume du novelojn estas **la 30-a de septembro 2023**.

La retejo de la konkurso estas: <https://bobelarto.ink/konkurso>

## Rezultoj de la Eo-Tago en Rumanio

Okaze de la Tago de Esperanto, aperis en la gazeto *Faĉlia de Cluj* kaj en la reta ĵurnalo *Gherlainfo* artikolo pri Esperanto. Sube estas la ligiloj! Dankon al Mariana Berariu!

<https://ziarulfaclia.ro/ziua-internationala-a-limbii-esperanto-marcata-la-gherla/>

<https://www.gherlainfo.ro/ziua-internationala-a-limbii-esperanto/>

Aurora Bute

SMG: Mi celis arigi el multaj landoj rezultojn en la Eo-Tago, sed la rezulto estis absoluta silento. Ĉu nur en Rumanio oni agis? Mi ne kredas. Raportu al mi!

## UK Kuriere

“La Taŭra Voĉo” estas la titolo de la ĉiutaga kongresa kuriero de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kiu nun okazas en Torino. En la retejo

de UEA jam estas legeblaj tri numeroj. Legu pli ĉe  
<https://sezonoj.ru/2023/07/torino-25/>

## UK – Kleriga Lundo

En la programo de la 108a Universala Kongreso de Esperanto en Torino estas Kleriga Lundo, kiu okazas en tri blokoj kun kelkaj samtempaj programeroj. Legu pli en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto  
<https://sezonoj.ru/2023/07/torino-24/>

## Interlingvistika revuo (Ipi) en novaj manoj

Aperis nova numero de Ipi el la manoj de nova redakta teamo:

Başak ARAY, KIMURA Gorō Christoph (木村護郎 クリストフ), Jorge Antonio LEONI DE LEÓN kaj Bengt-Arne WICKSTRÖM.

La numero konsistas el kvin sekcioj: Eventoj, Universitata kaj Esplora Agado, Kulturo, Personoj, kaj Bibliografiaĵoj. La teamo reenkondukis la bonan kutimon de Detlev Blanke, dediĉi apartan atenton al elstaraj interlingvistoj okaze de signifaj jubileoj. Ĉi-numere temas pri Ilona Koutny, kiu festis sian 70-jariĝon en 2023 kaj antaŭnelonge atingis ankaŭ 25 jarojn de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano.

La nova, duobla numero 123-124 estas elŝutebla ĉe la retejo de CED:  
[https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2023/07/Ipi\\_123.pdf](https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2023/07/Ipi_123.pdf).

Arkivo de antaŭaj numeroj estas trovebla ĉe

<https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo/>.

Komentojn, sugestojn, kaj kontribuojn sendu al: [ipi@interlingvistiko.net](mailto:ipi@interlingvistiko.net).

Mark Fettes, Direktoro, Centro de Esploro kaj Dokumentado, UEA

## Reklamo por ILEI kaj TEJO en Lignano

Jen reklamvideo, de Laura Brazzabeni en Torino, kiu krome anoncas al vi la aktivecon de Esperradio ([www.facebook.com /Esperradio](https://www.facebook.com/Esperradio))

<https://youtu.be/8J9wV6MhpYA>

## Aŭgustaj jubileantoj

En la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” aperis listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por aŭgusto 2023, kompilita de Aleksander Korĵenkov. En ĝi estas gravaj figuroj de la pasinteco (Carlo Bourlet, Michel Duc Goninaz, Jerzy Fornal Nikolai Lozgaĉev, Han Moo-hyup k a.) kaj du nuntempaj elstaraj esperantistoj, kiuj ĵubileas ĉi-monate: Ulrich Lins (80 jaroj) kaj Probal Dasgupta (70 jaroj). Legu ĉe <https://sezonoj.ru/2023/08/augusto-2/>

## Reviviĝo de Bosnio-Hercegovino kun nova prezidanto

E-Ligo de Bosnio-Hercegovino en la Ĉefkunveno okazinta pasintan monaton en Sarajevo akceptis agadplanon por sekvonta periodo kaj elektis novan estraron. Por la prezidanto estas elektita Šefik Rizvanović, multjara aktivulo. Esperanto en Bosnio notas ĉi-jare 113 jarojn ekde fondiĝo de la unua E-societo en la lando.

Krom ĉesigoj dum la unua kaj la dua mondmilitoj, ekde 1949 la tutlanda asocio senĉese agadas. En 1973 kaj 2006 en Sarajevo okazis TEJO-kongresoj (*SMG partoprenis ambaŭ, estinte en 1973 efektiva juna*) kaj tra la jaroj en diversaj bosniaj urboj pluraj landaj, regionaj kaj internaciaj aranĝoj. Kulmino de la ĝisnuna agado okazis en la okdekaj jaroj de pasinta jarcento kiam aktivis preskaŭ 100 societoj, kluboj, rondoj kaj lernejoj E-sekcioj kun sume ĉirkaŭ 10.000 membroj. En la agadplano por 2023-2024 estas planitaj novaj E-kursoj en pluraj bosniaj urboj. Nova sekretario de la Ligo estas Edin Ĉolić kaj kiel estraranoj elektiĝis d-ro Samir Ribić, Brankica Bajić kaj Selma Zvirac.



Esperanto Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Kralja Tvrtka 19, BA-71000 Sarajevo. [info@esperanto.ba](mailto:info@esperanto.ba)

## Eterne aminda elsendo de Madagaskaro

Jen la ELENDO N°133 de Aminda Radio Esperanto. Temas pri la lasta podkasto ĉar nur septembre ni denove renkontiĝos ĉi tie. Jen la enhavoj:

1. Frutempaj patriotoj en Malagasio (Parto 1-a)
2. Kelkaj novaĵoj de nia lando
3. Liberpensula frakcio prezentita de Dominiko Simeone de SAT
4. La kanto « Ludu nun » de Klarissa el ŝia albumo « Ludu kaj kantu ».

<https://youtu.be/8JFkkEFRNjg>

Henriël FIDILALAO, Madagaskaro, ankaŭ redaktoro de monata revuo.

## Nova animacio: "La eskapo" de Luiza Carol

Jen Nova animacio: "La eskapo" de Luiza Carol

Jen Nova fino por la opero "Aida" de Verdi, kun grava pripensiga signifo por instruistoj. La animacio (animado), realigita de mi kun la helpo de belaj bildoj de polaj instruistinoj, premieros dum la ILEI-kongreso de Linjano Orsabra post kelkaj tagoj. Unu plia kialo por veni!

Alessandra Madella

Ni alkrōčas la liston de landnomoj, kun la aldono de Germanio. Bv. uzi ĉi tiun version kaj forigu la antaŭan.

===== vortoj: 1165 =====

La kolekto de EKO: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 42).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaj Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldona al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedlistoj. Pri petoj pri forfaligo el la ricevantoj. Tio facilas por la grupoj kun unuopaj adresoj: Landaj kaj Fakaj Asocioj, la Gazetaro, ricevantoj el AMO-seminarioj 20-72. Aliaj ricevantoj ricevas la komunikojn pere de ret-grupoj, pri kies enhavo EKO havas nenian influon..